Numero dua. Dimanĉon 7-an de aŭgusto

# Kongresa Sciulo

Kongresa Kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto

## Ekumena diservo

**Gregoria ĉantado en Esperanto, nova traduko de himno kaj pli!**

Dum la 107-a UK okazos tradicia ekumena diservo, sekvante la fortan tradicion de la Universalaj Kongresoj – Zamenhof mem ĉeestis ekumenajn diservojn! Ĉi-foje la diservo okazos en la anglikana katedralo (katedralo Christ Church Cathedral). Notu ke la katedralo estos ornamita de ĉielarkaj flagoj kaj rubandoj por la Fiereca Semajno, kiu okazas en Montrealo antaŭ la UK kaj dum la UK.



Interna ornamado de la katedralo

Post la ekumena diservo estos luterana-anglikana meso, kiun prezidos Pastro Joel Amis (Anglikana Eklezio de Kanado) kaj dum kiu predikos Pastro Hanso Becklin (Evangelia Luterana Eklezio de Usono). Ĉiuj estas bonvenaj resti por la dua parto de la diservo – alivorte, oni **ne** devas esti anglikano aŭ luterano por ĉeesti. Absolute ĉiuj estas bonvenaj! La direktoro de la muzika programo kaj la orgenisto/pianisto estas Andrew Sly (estrarano de Kanada Esperanto-Asocio). Lin helpos kaj kungvidos en kantado Ĵenja Amis (ankaŭ estrarano de Kanada Esperanto-Asocio kaj la sekretario de la LKK). La teamo preparis por vi riĉan muzikan enhavon, kun la Esperantaj versioj de konataj himnoj kaj unu nova traduko: *Garnu vin, animo kara,* de *Schmücke dich, o liebe Seele* (traduko de Hanso Becklin, muzika aranĝo de Andrew Sly). Atendos vin ankaŭ du gregoriaj ĉantoj, unu el ili adaptita de Andrew Sly, kaj unu ĥora peco. Ni ankaŭ kantos la saman himnon, kiu estis kantita dum la Sesa Internacia Kongreso en Vaŝingtono (Patro nia, ni alvenis), de Clarence Bicknell.

La ne-esperantistaj gastoj estas tre bonvenaj, sed la diservo okazos en Esperanto. Bonvenon al tiu ĉi neforgesebla sperto!

**Kie:** 635, rue Sainte-Catherine Ouest, Montréal (20 min de la kongresejo piede — el la ĉefa pordo de la kongresejo, iru maldekstren ĝis adresnumeroj malkreskos ĝis nul kaj rekreskos ĝis 635; aŭ metroe ĝis la stacio McGill, laŭ la verda linio).

**Kiam**: dimanĉon 7-a de aŭgusto, 15:30





**Estu preta por la fiereca parado kun la ĉielarka t-ĉemizo!** Vidu ĝin kaj aliajn belegajn memoraĵojn en la kongresa butiko!



### GRAVEGE!
### Ŝanĝo de la loko por komuna fotado

Anstataŭ la korto de la kongresejo, ni fotiĝos ĉe la Placo de Festivaloj, ĉe la granda ŝtuparo. Do sekvu la volontulojn -- ili montros al vi la vojon. Tiu loko troviĝas 2 minutojn for de la teatro (piede).



# Semjana veturbileto

Hodiaŭ estas la perfeka tago por aĉeti semajnan virtualan busan kaj metroan bileton, kiu validos de lundo al dimanĉo. Por tio vi devas posedi aŭ akiri Opus-Karton (carte Opus: kArtopUs) kaj aĉeti el maŝino aŭ ĉe metrogiĉeto *titre hebdo pour zone A* (ebdO pur zOn A). Ĉe maŝino, la elekto legeblos: ZONE A HEBDO LUN-DIM. Iuj (pli grandaj) maŝinon akceptas monbiletojn; ĉe giĉeto, oni devas pagi per karto. Eblas ankaŭ aĉeti la karton kaj la virtualan bileton ĉe Pharmaprix Saint-André, je 901, rue Sainte-Catherine Est, ĉe la kaso. La busbileto kostas 29 CAD-jn; la Opus-karto, 6 CAD-jn. Opus-karto nepre devas enhavi bileton.






Tiu bileto rajtigos vin uzi senlime la tutan metroan reton (krom iri al kaj el la stacioj Longueuil-Université de Sherbrooke, Cartier, De La Concorde kaj Montmorency, kiuj estas ekster Montrealo, do en zono B) kaj ĉiujn publikajn busojn en Montrealo.

Notu, ke la senpaga eniro en kelkajn metrostaciojn validas nur semajnfine.

# Manĝi vegetare en Montrealo

TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio) kaj montrealanoj pretigis por vi gvidilon pri vegetaraj kaj veganaj manĝaĵoj en Montrealo. Prenu ĝin dum la Movada Foiro de la tablo de TEVA aŭ konsultu en la gvidilon: mallonge.net/vegetare2022 — ĝi troviĝas en la retejo de la LKK, sekcio *Ekskursoj, memgvidaĵoj:* esperanto2022.ca/eo/ekskursu). Vi trovos tie la liston de rekomenditaj vegetaraj kaj veganaj restoracioj kaj manĝaĵ-vendejoj proksime al la kongresejo.

*Kongresa Sciulo* estas la kongresa kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, en Montrealo, Kebekio, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto de 2022. Redaktas Sylvain Auclair. Redaktejo: ĉambro Milojević, Université du Québec à Montréal, DS-R340. Nova numero aperas ĉiumatene (krom en merkredo). Eblas elŝuti koloran version per apo trovebla je uk2022.glideapp.io. Kontribuojn (tekstojn kaj fotojn) sendu al jrsylvain.auclair (ĉe) gmail.com.

© Universala Esperanto-Asocio, 2022.

Dépots légaux: Bibliothèque nationale du Québec et Bibliothèque nationale du Canada, troisième trimestre, 2022.

# Manĝejoj

En nia kongresejo troviĝas manĝejo *Ginkgo*. Menuo en la franca: ginkgocafebar.ca La traduko de la menuo en Esperanto: mallonge.net/menuo2022.

Apud la kongresejo ankaŭ troviĝas pluregaj manĝejoj. El inter la grandaj, kie vi povas manĝi ope (stilo *food court* usona) kaj trovi plej diversajn pladojn, estas la jenaj:

**Manĝejo de Place Dupuis,** 845, rue Sainte-Catherine Est. Funkcias de 6-a ĝis 19-a en lundo, mardo kaj vendredo; ĝis 21-a en ĵaŭdo kaj vendredo, ĝis 17-a en sabato kaj dimanĉo. Ses minutoj piede de la kongresejo. Iru al la direkto de la hotelo Hyatt.

**Le Central,** 30, rue Saint-Catherine Ouest. Funkcias de la 11-a ĝis la 22-a (vendrede kaj sabate ĝis la 23-a vespere). Ne funkcias dimanĉe. Ses minutojn piede de la kongresejo. Iru al la direkto de la teatro Impérial (Salono Zamenhof). Enhavas drinkejon (vi povas aĉeti manĝaĵojn aĉetitajn en la sama manĝejo).

Manĝejo en **Complexe Desjardins.** 150, rue Sainte-Catherine Ouest. Funkcias de 9:30 ĝis la 18-a lunde, marde kaj merkrede; de la 9:30 ĝis 21a ĵaŭde kaj vendrede kaj de 9:30 ĝis l7-a sabate. Dimanĉe — inter tagmezo ĝis la 17-a. Ok minutoj piede de la kongresejo.

# Kongresa fotoalbumo

Ĉu vi ŝatas fari fotojn aŭ videojn? Ni ĝojas! Estu vi inter la fotistoj de la kongreso. Ĉar la oficiala kongresa fotisto ne povas esti ĉie (kaj certe ne en pluraj lokoj samtempe), ni invitas ĉiujn fotemulojn kaj videemulojn foti kaj filmi dumkongrese. Certigu ke la fotado / filmado tamen ne ĝenas la prelegantojn kaj partoprenantojn. Dividu viajn fotojn kaj videojn en la komuna albumo: mallonge.net/fotoj2022

/Ĵenja Amis

# Internacia Kongresa Universitato — hibrida

Laŭ decido de la Estraro, la Internacia Kongresa Universitato (IKU) estos hibrida, ĉar kelkaj prelegantoj ne povos fizike prelegi. Tio signifas, ke eblos spekti la 7 prelegojn de IKU kaj la 8 prelegojn de Scienca Kafejo per Zoom. La adreso por ĉiuj prelegoj, samkiel por la IKU-inaŭguro dimanĉe, la Scienca Forumo vendrede kaj la Faka Forumo lunde, estas https://huji.zoom.us/j/7508982919, sen pasvorto.

## Nomo de la kongresejaj ĉambroj

# Albert Saint-Martin (1865–1947)

Saint-Martin profesiis kiel stenografiisto en la Supera Kortumo kaj estis unu el la plej aktivaj esperantistoj en Montrealo inter 1902 kaj 1925. En 1902, li rapide lernis Esperanton kaj instruis la lingvon tuj, ĉefe en Montrealo kaj Maskuto (Saint- Hyacinthe). Inter 1902 kaj 1904, Saint-Martin verkis multe kun Pierre Beauchemin en *La Lumo* sub la plumnomo Albert-Frédéric Rembert. En 1905 li foriris al Eŭropo kun siaj gefiloj por ĉeesti la Unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Bulonjo ĉe maro. En 1905 Saint-Martin estis nomumita kiel unu el la membroj de la Lingva Komitato.



Lia naskiĝo en la montreala laborista kvartalo Hoŝelago influis lian vivon : li ĉiam ion faris por laboristoj. Dum liaj esperantaj agadoj, Saint-Martin estis sekretario en la Laborista Partio, kiu estis fondita en 1904–1905. En 1906 Saint-Martin paroladis esperante, france kaj angle dum socialista kunveno.

En 1907 (aŭ 1925 ?) li kunfondis la Esperantan Kooperativon por helpi la malriĉajn laboristojn kaj senlaborulojn. La ĵurnalisto Larivière skribis : « Esperanto estis lingvo jam tre disvastigita en la laboristaj rondoj, ĉar ĝi permesis al laboristoj komuniki trans la lingvaj kaj naciaj limoj. »

Albert Saint-Martin faris prelegojn, instruis Esperanton kaj fondis eldonejon. Li financis la eldonadon de la revuo *La Lumo* dum du jaroj kaj skribis multajn artikolojn pri ŝanĝo de la Esperanta ortografio. Unu el la plej aktivaj Esperantaj disvastigantoj en Montrealo, Saint-Martin ankaŭ prelegis multfoje, batalis por la lingvo de la komenco ĝis sia morto.

En 1935 Albert Saint-Martin kunlaboris en la fondo de Laborista Universitato (Université ouvrière), kies arkivo estis sufiĉe detruita de faŝistaj brigadoj.

Ambaŭ gefiloj de Saint-Martin estis aktivaj esperantistoj. Lia filino Berthe eklernis Esperanton tre juna kaj ŝi ĉeestis kunvenojn de Virina Klubo Progreso. Laŭ
Vikipedio, ŝi estis « la juna knabino, kiu portas lampon disradiantan la mesaĝon : 'pri, per, pro, por Esperanto' sur la kovrilo de la revuo *La Lumo* ». Lia filo Théode estis sekretario de Klubo Progreso.

\Zdravka Metz, La Riverego, marto 2020

## Subskribu vian Kongresan botelon

Dum tiu ĉi kongreso vi en via kongresa sako ricevas donace de LKK ankaŭ tre belan *kongresan botelon*. Uzu ĝin por plenigi per akvo (aŭ alia via preferata trinkaĵo) dum la kongreso (kaj espereble dum multaj aliaj eventoj estonte).



Tiel ĉi ni povas komune kaj ŝpari kaj la medion kaj proprajn monujojn. La kranakvo en Kanado estas trinkebla, do vi povas uzi ankaŭ simple la kranojn en necesejoj, aŭ iun el la akvo-fontanetoj por trinki sur la stratoj tra la urbo. Kion ni tamen rekomendas, estas subskribi vian botelon (aŭ marki ĝin iamaniere), ideale de subo de la botelo, por eviti perdojn/interŝanĝojn/erarajn prenojn de alies botelo. Uzu por tiu prefere permanentan (ne forviŝeblan) skribilon (se vi ne havas tian, venu al Informejo por prunti ĝin).

## Subskribu vian Kongresan libron

Por povi facile re-trovi ĝin, ne intermiksi kun alies - ni rekomendas ankaŭ subskribi vian kongresan libron. Facile vi povas ene enskribi vian nomon kaj ideale ankaŭ la Kongresan numeron (KN) - laŭ kiu oni povos sekve facile kontakti vin, aŭ transdoni vian libron en la Informejon, kaze ke vi perdus/forgesus ĝin ie. En via libroj vi ja povas fari notojn, marki programerojn... tial utilas havi ĝin subskribitan.

Aldone - se vi mem trovos alies kongresan libron (kaj ĝi ne estas subskribita aŭ vi ne konas la personon), bv. porti ĝin al la Informejo - tie ĝi povas atendi la perdinton.

## Pucino, fum-viando, bagelo kaj pli!

Ĉar vi estas en Montrealo, vi devas provi almenaŭ unu (sed prefere ĉiujn!) el tipaj montrealaj pladoj! Ni pretigis por vi la prov-liston kaj rekomendon de manĝejoj: mallonge.net/pladoj2022 — ĝi troviĝas en la retejo de la LKK, sekcio *Ekskursoj, memgvidaĵoj:* esperanto2022.ca/eo/ekskursu.

/Ĵenja Amis

## Festivalo pri Indiĝenaj Kulturoj

De la 9-a ĝis la 17-a de aŭgusto en Montrealo okazos la Festivalo pri Indiĝenaj Kulturoj de Kanado. Ĝi okazos proksime de la kongresejo (pluraj prezentaĵoj okazos apud la metrostacio Place des Arts), do facile atingebla piede. Ne hezitu viziti la festivalon, aparte merkrede, kiam ne okazas programo en la kongresejo. presenceautochtone.ca

## Teatraĵo *1910* kromaktoroj bonvenas!

En ĵaŭdo 11-a de aŭgusto, okazos premiero de freŝverkita teatraĵo pri la vizito de Zamenhof al Ameriko. Ĉu vi ŝatus esti krom-aktoro? Via rolo estos tre simpla: vi devos legi fortvoĉe unu aŭ du demandojn al la aktoro. Vi havos tekston. Se vi interesiĝas, vi devos veni al unu el du provludoj (mardon 9-11 matene aŭ ĵaŭdon 9-11) en la teatro Impérial (Salono Zamenhof) — estos kafo kaj kelkaj manĝetoj ekde la 8:30. Ni bezonas ĉirkaŭ dekon da homoj. Plej bone skribu al Ĵenja Amis por certigi ke la lokoj antaŭ ol veni por certigi ke ni havas por vi (etan) rolon. Yevgeniya.amis (ĉe) gmail.com

## Ŝanĝoj al la programo

**Aŭtora duonhoro 1 okazos je la 16:00 en salono Saint-Martin (ne 17:15)**

Sama programo, Zdravka Metz (Birdoj en nia korto) kaj Normando Fleury (Besta Verbaro) prezentos siajn librojn.

\LKK



**Averto pri varmo**

**Hodiaŭ:** 31°, verŝajna pluvo aŭ fulmotondro

**Vespere:** 19°, pluvo

**Nokte:** 17°, pluvo aŭ pluveto

**Morgaŭ matene:** 18°, pluvo

## Novaj aliĝintoj

Keaton Nacu, *Kanado*
Simeon Le Nepveu, *Luksemburgo*
Dietrich M. Weidmann, *Svislando*
Clément Baleyte, *Francio*
Victoria García Aquino, *Dominika Respubliko*
Konstanze Schönfeld, *Germanio*
Willow Watson, *Usono*
Cyrielle Sérézat, *Francio*
Victor Guérout, *Francio*
Jakob Caisip, *Usono*
Tara Cox, *Usono*
Matthew Rankin, *Kanado*
Ana Montesinos de Gomis, *Britio*
Chlag Amraoui, *Kanado*
Daniel Paul Stoltzfus, *Kanado*
Bïa Krieger, *Kanado*
Márta Dikman, *Kanado*
Robert Brooks, *Usono*
Sheheryar Parvaz, *Kanado*
Xavier Aniello, *Usono*
Victor Agosto, *Usono*
Jaden Campbell, *Usono*
Tony Nogneng, *Francio*
Aleksandr Chebotarev, *Usono*
Maria Milanova, *Kanado*
Sabrina Corriveau-Maheu, *Kanado*
Victor Kitu Apathe, *D.R. Kongo*
Valentin Ceretto Bergerat, *Francio*
David G Simpson, *Usono*
Adonis Marcelo Saliba Silva, *Brazilo*
Raphael Borun Das Gupta, *Svislando*
Albane Pélisson, *Kanado*
Tašila Koziej, *Kanado*
David Yaki, *Kanado*
Vilhelmo Framptono, *Kanado*
Francis Miville, *Kanado*
Henri Stack-Lévesque, *Kanado*
Jose Carrillo-Muniz, *Kanado*
Jong Hee Yea, *Kanado*
Kenneth F Price, *Kanado*
Kim Gravelle, *Kanado*
Linda Niksic, *Kanado*
Marc Munos, *Kanado*
Regan Ross, *Kanado*
Colin Woodbury, *Kanado*
Julie Schwartz, *Nov-Zelando*
George W Partlow, *Usono*
Naum Kopman, *Usono*
Leland Bryant Ross (Haruo Ros), *Usono*
Linda McCargar, Usono
Sofiya Soskina, *Usono*
Stefania Maria Czyczlo, *Kanado*
Annette Brasor, *Usono*
Will David Norton, *Usono*
Basilicia García, *Usono*
Benjamin E Stevens, *Usono*
Chris Nelson, *Usono*
Chris Pacejo, *Usono*
Chris Li, *Usono*
Michael J Cuddy Jr, *Usono*
Eric Killian, *Usono*
Hannah Frolik, *Usono*
John S Gorny, *Usono*
Joan Hoenow, *Usono*
Scott H Page, *Usono*
Marie Smith, *Usono*
Sara Stevens, *Usono*
Tom Wolf, *Usono*
Zed Zhou, *Usono*
James J Droege, *Usono*
Jason Mey, *Usono*
Ann Jenks, *Usono*
Shawn Knight, *Usono*
Liese Lemay, *Usono*
Monique Kim, *Usono*
Mundy Jason, *Usono*
Jennifer Mundy, *Usono*
Chris Walker, *Kanado*
Jamie Preston, *Usono*
Jérémie Kahindo, *D.R. Kongo*

## Hodiaŭ

**Solena inaŭguro,** *salono Zamenhof,* 10-12.

**Komuna foto,** *Place des festivals,* 12:45.

**Internacia Kongresa Universitato,** *inaŭguro*, Nourmont, 13.

**Jardekoj de la indiĝenaj lingvoj,** enkonduko, *Solis*, 15.

**Nacia vespero,** *salono Zamenhof,* 19-22.